



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2021 (222) 20. 9. 2021

Bukedo por Jaroslav Šustr



En aŭtuno 2019 ni rememorigis per solena prelego kaj per speciala numero de Bulteno nian iaman faman prezidanton Jaroslav Šustr. Post du jaroj Tomáš Břicháček havis okazon viziti lian tombon en Ústí nad Orlicí kaj surmeti florojn nome de la tuta klubo. *(Legu pli sur la p. 3)*

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Saluto kaj alvoko (T. Břicháček)	4
Ĉina, Korea, Japansko (P. Chrdle)	5
La sindikato (E. Bass)	8
Rompebla feliĉo (F. Šrámek)	10
Ĉielarka punkto super la kapo (J. Arbes)	14
Mia kunklasano Tureček (I. Herrmann)	20

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Prago 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brighacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

AKTUALAĴOJ

Aranĝoj kaj okazintaĵoj

07/01/2021 – interreta prelego de Petr Chrdle pri novaj libroj de KAVA-PECH

15/04/2021 – interreta prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de d-ro Zamenhof en Varsovio“ – parto 1


16/04/2021 – aperis Bulteno n-ro 1/2021

26/07/2021 – interreta prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de d-ro Zamenhof en Varsovio“ – parto 2

18/08/2021 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi

20/09/2021 – aperis Bulteno n-ro 2/2021

Surspure de d-ro Zamenhof en Varsovio



Dufoje dum la lastaj monatoj Pavla Dvořáková pretigis por nia klubo ege interesajn interretajn prelegojn, kiujn ŝi nomis *Surspure de doktoro Zamenhof en Varsovio*. Temis pri virtualaj promenoj tra la lokoj, kie d-ro Zamenhof vivis, studis, laboris, mortis kaj estis

entombigita. La unua prelego okazis la 15-a de aprilo (unu tago post la forpasdatreveno de Zamenhof) kaj la dua la 26-an de julio, kiu estas la Tago de Esperanto.

Pavla montris al ni, ĉe kiuj adresoj d-ro Zamenhof loĝis, tra kie li supozeble iradis, kie li ĉerpis fortojn, kiujn konstruaĵojn tiutempe vidis liaj okuloj, kiuj el ili estis post la 2-a mondmilito renovigitaj kaj kiu ne, kiel tiuj lokoj aspektas nuntempe. Etoson de Varsovio ŝanĝe de la 19-a kaj 20-a jarcentoj ni iom enflaris pere de malnovaj bildkartoj kaj fotografiaĵoj, kiuj estis kompletigitaj per interesaj detaloj el la vivo de Zamenhof.

Bukedo por Jaroslav Šustr

Tomáš Břicháček

Dum nia ĉi-jara familia libertempo en Orlické hory komence de aŭgusto ni planis viziti ankaŭ Ústí nad Orlicí. Mi rememoris, ke tie estas sepultita la iama eminenta prezidanto de la praga klubo Jaroslav Šustr (al kiu ni dediĉis la tutan N-ron 2/2019 de nia Bulteno).

La administracio de la tombejo (temas pri tiel nomata Nový hřbitov) informis nin, ke la tombo de Šustr devus esti en loko CD/3 n-ro. 13, 14 (CD estas sektoro, 3 estas vico) kaj ke ĝi estas duobla tombo. En la tombo laŭdire ripozas ankaŭ la patro Karel Šustr (+ 1956).

Fakte, kiam ni venis en la tombejon, ni havis problemojn orientiĝi tie. Oni facile trovas sektoron kaj eble ankoraŭ vicon, sed tie estas neniuj numeroj apud la tomboj.

Fine ni trovis en la koncernata vico iun grandan – ŝajne duoblan – tombon tute kovritan de hedero sen iu videbla surskribo. Ĝi povis estis la ĝusta. Kiu scias? Ĉiukaze ĝi certe estis proksime de la loko. Do mi metis mian bukendon tien.

Sukcesa Helpu helpi 2021

Vlasta Piščíková

La 18-an de aŭgusto 2021 okazis jam la oka aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.

Estis kolektita mono por 42 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke kaj apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!

Termíny schůzek klubu září – prosinec 2021

2. 9., 30. 9. / 14. 10. / 11. 11., 25. 11. / 9. 12.

Schůzky probíhají vždy od 17 hod. v klubovně Ve Smečkách 25.
--

Saluto kaj alvoko

Tomáš Břicháček



Karaj geamikoj,
mi salutas vin post longa periodo de limigita funkciado de nia klubo. Senĉese ripetiĝantaj registaraj malpermesoj kaj restriktaj rilataj al KOVIM-19 havis detruajn konsekvencojn por nia agado. Dum la unua ĉi-jara kunveno (la 2-an de septembro 2021) ni kun teruro konsciiĝis, ke pasis preskaŭ ĝuste unu jaro ekde la lasta renkontiĝo. Ni malkutimiĝis vidi nin persone. Diversaj interretaj prelegoj estis certe utilaj – kaj dankon al ĉiuj organizintoj – sed nun necesas plene renovigi la kluban vivon.

Pro tio mi volus inviti vin, ke ni ĉiuj klopodu dum la resto de tiu ĉi jaro revivigi la klubon. Ĝis Kristnasko restas kvin kunvenoj. Ni provu trovi por ili riĉan kaj interesan programon! Ĉiu bonvolu pensi pri tio, kiel li aŭ ŝi povas kontribui.

La 30-an de septembro povus esti la unua viva kunveno kun diskuto. Mi volus antaŭmeti proponon pri fondiĝo de **kluba kanalo ĉe YouTube** kaj pri nova **interreta kurso** (konsistanta el 10 lecionoj kaj raportaĵoj el la kluba vivo), kiu povus esti elsendata ĝuste tie. Ankaŭ la **nova Bulteno 2/2021** estos prezentita. Oni ankaŭ devas fiksi la programon por la sekvantaj semajnoj.

Jen ideoj, pri kiuj oni parolis: La unua estis **muzika vespero**, kie ni povus lerni kaj kanti Esperantajn kantojn. Eble iuj ankaŭ volos paroli pri siaj **vojaĝoj**. Fine, mi pensas, ke indus dediĉi unu kunvenon al **prelego pri Eli Urbanová**, ĉar en januaro 2022 pasos 10 jaroj ekde ŝia forpaso.

Kiam mi skribas tiun ĉi leteron, somero malrapide finiĝas kaj aŭtuno jam estas proksime. Mi tiuokaze retrospektas la saman jarperiodon, sed dudek jarojn antaŭe – jes, en la drama jaro 2001 abunda je eventoj. Precize tiam – en septembro kaj oktobro 2001 ĉirkaŭ la komenco de miaj universitataj studoj – mi ellernis Esperanton kaj ekkonis unuajn esperantistojn. Tiu datreveno (kaj belaj rememoroj rilataj al ĝi) inspiras min labori por la klubo pli ol kutime.

Fartu bonege, bonvolu pensi pri revivigo de nia agado kaj ĝis revido en la klubejo Ve Smečkách kaj alie!

13. 9. 2021

Eblo antaŭmendi interesan libron kun granda rabato

Petr Chrdle

Petr Chrdle: *Ĉinio, Koreio, Japanio* kun la subtitolo **La landoj similaj, sed diferencaj**. La aŭtoro priskribas siajn impresojn el la landoj, kie (precipe en Japanio kaj Koreio) li havis bonŝancon ekkoni la vivon de la lokuloj en iliaj hejmoj, en universitatoj, sed ankaŭ en religiaj centroj. La libro estas preparata en du lingvaj versioj, en la ĉeĥa, kiu aperos ankoraŭ ĉi-jare, kaj en Esperanto. Ĉar la libro estos plenkolora, en pinta kvalito, ĝia eldono estos finance tre postulema. Tial la Esperanto-versio povos aperi nur post kiam revenos per vendoj almenaŭ sentebla parto de la mono enigita en la ĉeĥan eldonon. Por ke pri la ĉeĥa eldono povu ekscii ankaŭ komencantoj, mi daŭrigas ĉeĥe.

Petr Chrdle: *Čína, Korea, Japonsko* s podtitulem **Země podobné, avšak rozdílné**.

Autor popisuje své zážitky v uvedených třech zemích, které opakovaně navštívil (Japonsko 10x, Koreu 7x, Čínu 3x). Tam měl možnost (zejména v Jižní Koreji a Japonsku) poznat zblízka jak život v rodinách, tak i na univerzitách a v náboženských centrech. Zaměřuje se mj. na rozdíly života, etikety a vůbec zvyků jednak mezi tím, co mají tyto země společné, avšak rozdílné oproti nám v Evropě, ale také, jaké jsou rozdíly mezi těmito třemi jednotlivými zeměmi. Vyprávění je doprovázeno mnohými barevnými fotografiemi autora pořízenými během cest.

Obsah:

Úvod

Pár kapek z historie

Země podobné, avšak rozdílné

Úvod k následujícím třem kapitolám


Dojmy z Číny

Dojmy z Koreje

Dojmy z Japonska

V době psaní tohoto článku není ještě kniha vysazena, tedy není možné vykalkulovat cenu, ale i tak už nakladatelství vypisuje nabídku předobjednání. Bohužel už se ji nepodaří vydat před Vánoci, ale vyjde až začátkem roku 2022. Proto všem, kdo ji budou chtít darovat, pošleme profesionálně navržený darovací voučér a knihu na uvedenou adresu ihned po jejím vyjití.

Při úhradě předem bude cena se slevou 40 %, při nezávazné objednávce a úhradě až po vyjití 25 %. Objednávky, prosím, směrujte na info@kava-pech.cz, nebo poštou na KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice.



Úryvek z úvodu

... Asi bych se měl také zmínit, jak jsem se k cestování vlastně dostal. Vždy jsem rád četl cestopisy; a protože za mého mládí nešlo cestovat v reálu, toulal jsem se alespoň v představách a prstem po mapách. V roce 1991 u mne byl na návštěvě korejský přítel (seznámili jsme se zásluhou našeho společného koníčka, mezinárodního jazyka esperanto), profesor a majitel kliniky korejské tradiční medicíny Puramo Chong, který mne na oplátku pozval k sobě do Koreje. Řekl, že stejně jako on tady, i já budu jeho hostem, takže jediný výdaj, který s tím budu mít, bude cena letenky. Tomu jsem nedokázal odolat. A když už jsem byl tak daleko, „odskočil“ jsem si na tři dny za jiným esperantským kamarádem do Japonska,

protože mne ani ve snu nenapadlo, že bych se na Dálný Východ mohl ještě někdy podívat.

To mne namlsalo! Po sametové revoluci se už sice cestovat dalo bez omezení, ale v mém případě to nešlo, protože mi na to chyběly peníze. Tak jsem opustil dobře se rozvíjející odbornou kariéru, založil si firmu, Kongresovou a vzdělávací agenturu, a vedle jiných aktivit jsem si pořídil i živnostenský list na provozování cestovní kanceláře. Ten však jen proto, aby mi umožnil cestovat; i když za cenu, že si musím trasu dobře nastudovat, abych si zájezdy mohl sám průvodcovat, a cestou se budu muset starat o skupinu turistů.

Cíl cesty jsem nechal na náhodě. Začal jsem vždy tou zemí, kde byla velká esperantská akce (převážně Světový esperantský kongres), takže se jednalo o zájezd na danou akci, k níž jsem vždy přidal týdenní poznávací program. Měl jsem mezi esperantisty dobré jméno a důvěru, neměl v podstatě žádnou režii, protože vše jsem si zajišťoval sám s manželkou, nešlo mi o zisk a stačilo mi, když mi účastníci uhradili pobyt. Proto jsem neměl o zájemce nikdy nouzi. A brzy se k mému zájezdu přidali i esperantisté ze sousedních zemí, takže zájezdy byly už od prvního setkání na letišti mezinárodní a už od počátku se komunikovalo mezi účastníky převážně esperantem. I to u mých klientů zvýšilo jejich přitažlivost.

Tímto způsobem jsem procestoval nejen Čínu, Koreu a Japonsko, ale i Austrálii, Brazílii, Izrael, Singapur a další země. Potom se na mne obrátil majitel cestovní kanceláře Bortour Jiří Jelínek, který pořádal zájezdy na dálkové pochody podobně jako já na esperantské akce, jestli bych pro ně připravil zájezd na Mezinárodní ligu dálkových pochodů do Japonska, následně i do Koreje a na Tchajwan – a měl jsem další skupinu zájemců. Mezitím jsem navázal bližší kontakt s japonskými aktivními esperantisty a následně byl pozván na dvě přednášková turné po Japonsku, ale také na vedení konverzačního kurzu esperanta. V menším měřítku to bylo podobné v Koreji. ...

PROGRAMO DE ĈEA-KONFERENCO EN BARTOŠOVICE
2021-10-01/03

Vendredo, la 1-an de oktobro de la 14-a horo alveno de partoprenantoj kaj ilia loĝigo en kastelo

de 18-a horo – vespermanĝo

de 20-a horo – koncerto de artistoj de Nacia teatro en Prago –Ivan Acher kaj liaj gastoj

post la koncerto babilado kun la artistoj, komuna kantado, libera amuzo

* * *

Sabato, la 2-an de oktobro

de la 7:30-a horo kunsido de ĈEA-anaro

de la 12:30-a horo – tagmanĝo, poste komuna fotado

de la 14:30-a horo – busa ekskurso en urbon Kopřivnice kaj Štramberk, bus-bileto 100 kronojn (4 eŭroj), oni pagos en buso,

en Kopřivnice – vizito de skolta kampo Vanaivan kun mallonga programo ĉe Esperanto-ŝtono,

vizito de iu el tieaj muzeoj – Muzeo de Regiono kun, krom aliaj interesaĵoj, pentraĵoj de fama ĉeĥa pentristo Zdeněk Burian,

Muzeo de aŭtomobiloj-veteranoj TATRA,

en urbo Štramberk – trarigardo de la urbo, de turo TRÚBA, gustumado de speciala dolĉa bakaĵo, „oreloj de Štramberk“

de la 18-a horo vespermanĝo

de la 19:30-a horo koncerto de kant-horo KOS kun repertoaro de ĉeĥaj kaj Esperantaj kantoj

de la 20:30-a horo societa vespero kun dancado kaj kantado ĉe zimbazona muziko de knabina asembleo CERKĜ (KNABINETOJ)

* * *

Dimanĉo, la 3-an de oktobro

de la 7:30-a horo matenmanĝo

de la 9:00-a horo daŭrigo de la ĈEA-kunsido

de la 12-a horo – tagmanĝo, poste forveturo de la partoprenantoj de la konferenco (denove estas ebleco uzi aŭtomobilon de la organizantoj por atingi la stacidomon en urbo STUDÉNKA, de kie forveturas rapidvagonaroj)

La konferencon vizitos **televid-teamo POLAR** de urbo Ostrava, kiu intervjuos kelkajn partoprenantojn por sia TV elsendo.

Gulaŝo de organizantoj estas preparita por ĉiuj alvenantoj vendrede, la 1-an de oktobro.

LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

La sindikato Eduard Bass

Ivan Buňka, komitatano de la Sindikato de ĉeĥaj verkistoj, etendis sin en apogseĝo kaj rigardis la fumstrieton, suprenleviĝantan el egipta cigaredo. La fumo krispiĝis kaj ringe flugis, sed tra ĝia griza vualo Buňka vidis la tutan longan vojon, kiun la ĉeĥa verkistaro jam faris, dank' al la senlaca agemo de ĝia Sindikato ĝenerale, de ĝia komitato precipe kaj de Ivan Buňka antaŭ ĉiuj. Ĵus estis ĉi tie unu el la plej grandaj eldonistoj kun respekta peto, ĉu li rajtus eldoni kolekton da liriko de nia netaksebla Ivan Buňka. Ivan Buňka eĉ ne parolis kun li. Tiajn aferojn prizorgos lia sekretario en la antaŭĉambro. Ivan Buňka devis ekridi: kvazaŭ li vidus ilin.

„Permesu, tre estimata sinjoro sekretario, ke mi prezentu min respektplene al vi. Mi estas grandeldonisto Filip Bohumír Kocábek. Mia firmao estas al vi certe konata. La plej eminentaj kaj famaj majstroj de la plumo honoris min per sia konfido kaj presigas ĉe mi siajn verkojn. Tamen mi konsiderus speciala honoro, se mi povus... se mi rajtus... ehm... pardonu mian kompreneblan embarason.“

„Hm. Verŝajne vi volas eldoni iun verkon de Ivan Buňka?“

„Jes, jes. Mi estas tute konfuzita, ĉar ĝi estus por mi tia distingo, ke... Kompreneble, estimata sinjoro sekretario, ke mi aspiras al nenia profito! Estas ja vere, ke la plimulto de la eldonistoj unuiĝas en Sindikaton por la reguligo kaj plibonigo de siaj enspezoj, tamen... inter ni dirite ... por mi estus pli grava la honoro esti eldonanto de nia glora majstro kaj do mi estas preta al ĉia ofero.“

„Mi sekvis iomete vian agadon – kompreneble nur kiom mia libera tempo tion permesas.“

„Mi komprenas, plene komprenas. Vi estas tro ŝarĝita per laboro, ol ke vi povus sekvi eĉ la senpretendan agadon de simpla grandeldonisto.“

„Ho, mi petas, ni faras, kion ni povas. Sed en la hodiaŭaj cirkonstancoj mi ne povas vekti en vi grandajn esperojn. Vi konsentos mem: nepra manko de skribpapero...“

„Se vi permesus... mi tute ne atendas gajnon. Male, mi pagos ĉiujn elspezojn, paperon, preson, grafikartiston, reklamon kaj mi ne volas eĉ heleron por tio! La tutan enspezon povas reteni la fama majstro, sole se li konsentos, ke aperu sur la libro mia nomo kiel eldonanto.“

„Hm... via propono ja ne malhavas ion interesan, sed interalie mi rememorigas, ke ni havas ĉi tie amasegon de samaj petoj.“

„Tamen se estus eble, ke mi parolu persone kun la majstro... mi havas ĉi tie rekomendan leteron de la opereta kantistino fraŭlino Mrnina.“

„La majstron oni ne povas nun ĝeni. Li ripozas post la tagmanĝo. Se vi havas ian specialan rekomendon, aldonu ĝin al la petskribo, kiun vi povas transdoni al mi dum ofiĉoroj.“

„Mi dankas, estimata sinjoro sekretario. Vi estas tre afabla. Kaj kiam mi rajtus esperi je bonvola respondo?“

„Tio estas malfacile direbla. Ni havas tro multe da aliaj zorgoj. Venu informiĝi... eble post kvarona... aŭ prefere post duonjaro.“

Ivan Buňka ridetas super la cigareda fumo. Kiel ŝanĝiĝis la cirkonstancoj! Jen ekzemple la hodiaŭa anonco en gazeto:

„52-jara ĉeĥa grandeldonisto, patro de kvar malgrandaj infanoj, troviĝanta en la plej granda mizero, petas la estimatajn sinjorojn verkistojn pri ia ajn okupo. Kopiado de manuskriptoj, farado de korektoj, skribado laŭ diktado, bonvenaj. Afablajn proponojn sub ĉifro: ‚Diligenta kaj modesta‘ en la administracion de tiu ĉi gazeto.“

Tamen venis ilia vico! Kaj nur per la giganta laboro de la nelacigebla Sindikato. Aŭdiĝis ja voĉoj de verkistoj tro timemaj, kiuj deziris la tiel nomatan prudentan harmonion kun la eldonistoj. Kiuj volis aranĝi la reciprokan rilaton en interkonsento kaj garanti al ambaŭ partioj profiton proporcian al iliaj meritoj. Sed la fieriĝintaj eldonistoj volis batalon kaj la Sindikato ĝin akceptis. La ĉeĥa publiko tujege konsciiĝis, kies partion ĝi devas subteni. La memhelpo de la aŭtoroj turnis la ludkarton kaj hodiaŭ estas li, Ivan Buňka, kiu havas vilaon apud Prago, aŭtomobilon kaj jaĥton, dum liaj eldonantoj apenaŭ ricevos pro lia protekto postenojn de skribistaĉoj ĉe la magistrato. La reprezenta domo de ĉeĥaj verkistoj estos post nelonge konstruita kaj estas jam necese prepari la festenon. Estos necese inviti la aŭtorojn el somerrestadejoj, maraj banlokoj kaj el luksaj ekspedicioj al Hindujo. La Sindikato devas labori per plena vaporo kaj ĝiaj komitatanoj ne estas sen zorgoj. Kiel beata estas laŭvere la vivo de tiuj parioj-grandeldonistoj, kiuj faciligas sian mizeran ekzistadon per glaso da biero en fulgumita gastejeto de Malgranda Kvartalo kaj ne havas eĉ imagon pri la zorgoj de granda mondo!

La cigareda fumo flugas ringe kaj krispiĝas. Iu frapas. La persona sekretario de Buňka respekte eniras pordon.

„Kion vi alportas por mi?“

„Estas vizito ĉi tie, majstro. Malriĉiĝinta grandeldonisto. Li petas ian subvencion.“

„Ree almozado! Ĉu mi ŝtelas?“

„Ankaŭ mi diris tion al li, majstro. Sed li ne lasas sin forsendi.“

„Ĉe la hodiaŭaj cirkonstancoj mi povas fari por li nenion. Vi ja scias: papero, inko, plumoj, ĉio estas ege plimultekostiĝinta. Kaj tiuj plumingoj! Kompreneble, tiuj homoj tion ne kalkulas! Aldone mia privata dungitaro, plialtigataj salajroj, multekosteco de nutraĵoj...“

„Ĉion mi diris al li, sed li ne moviĝis for de la antaŭĉambro. Li petas almenaŭ la Sindikaton pri ia subteno, kaj la majstro, kiel komitatano de la Sindikato.“

„Tio estas io alia. Donu al li dekkronan bankbileton, kaj ke li jam iracu.“

La sekretario kliniĝis kaj forglitis. El la antaŭĉambro aŭdiĝis trorapida dankado kaj laŭta laŭdado de la mizerulo grandeldonisto.

Ivan Buňka etendis sin en la apogseĝo. Lin superregis la feliĉega sento de farita mecenajo kaj jen...

En ĉiu bona rakonto estus nun skribite: „Kaj jen li vekiĝis.“

Sed ĉi tiu rakonto volas esti fidela bildo de la realeco.

Ne estas vere, ke Ivan Buňka vekiĝis.

Neniu komitatano vekiĝis tiumomente.

Male: la tuta Sindikato de ĉeĥaj verkistoj dormis plue.

Tradukis V. Ĉech

Rompebla feliĉo Fráňa Šrámek

La suno brilis, ĉe mia flanko iris virino kaj estis bela: ŝi estis mia edzino kaj tio estis la oka tago post nia geedziĝo kaj el tiuj ok tagoj tiu ĉi estis la plej bela. Mi ne scias, kiel tio okazis, ke nur tiutage malfermiĝis miaj okuloj kaj mi vidis mian tutan grandan feliĉon, mia vivo kuŝis antaŭ mi ŝanĝita kaj mia sango estis nova kaj pura. En la stratoj estis multaj homoj, multe pli ol iam ajn, sed eble tio nur ŝajnis al mi. Kelkmomente preterflugis nin tramo kiel ia bela ŝtormo; tio taŭge respondis al mia humoro kaj mia koro pafadis en tiun muĝadon kiel pistolo. Ni marŝis tra lokoj plenaj de suna brilo, kiel tra ora sablo kaj mi ne plu memoras, pri kio ni parolis; tio estis nur etaj aludoj, ŝaŭmo de la koroj, per kiu ni ŝerce surŝprucis unu la alian. Sed mi memoras, ke kontraŭ ni veturis gigo trenata de blanka ĉevalo.

„Rigardu, kiel blanka,“ diris Marta kaj ŝia voĉo tuŝis mian vizaĝon kiel branĉeto jasmena. Sammomente malfermiĝis mia koro, la blanka ĉevalo baŭmiĝis kaj traveturis mian koron kiel triumf-arkon. Ĉio finiĝis eminente, kaj kiam poste mi klopodis konvinki Martan, ke io tia efektive okazis, ŝi faris ridinde kompateman mienon kaj per fingro frapis signifplene sur la frunton.

Kiom mi sentis tiutage esti viro! Komprenu min, mia vireco subite havis ian novan, honoran kaj fruktoportan sencon. En mia koro iu verve moviĝis kaj io sonoris tie kiel bona metalo. Kaj forton mi havis. Ni iris sur la kajo kaj tiam mi deziris, ke iu ĉimomente falu en la akvon; mi estus saltinta post li kaj elakriginta lin per la dentoj. Kaj, pensante pri tio, mi eligis strangan sonon el inter la dentoj firme kunpremitaj. Marta alrigardis min demande. Kaj mi kapjesis. Ŝi demandis per la okuloj, mi kapjesis, tiel proksime unu ĉe la alia estis niaj koroj.

Kaj poste ni estis revenantaj hejmen. Marta subite ŝajnis esti tre laca kaj apogis sin peze je mi; sed mi komprenis tion, mi estis feliĉa, mi rememoris ion belegan, kio povus iam okazi kaj mi estis eĉ pli feliĉa. De sur iu turo falis sur nin liutaj batoj de horloĝo sonoranta kaj tiam ni haltis; ni rigardis supren kaj lasis flui tiujn sonojn sur niaj vizaĝoj kiel kelkajn pluvgutojn el malfermita, sonoranta ĉielo.

Sed hejme mi iom ektimis. Ni enpaŝis la ĉambron kaj Marta, eĉ ne demetinte la ĉapelon, peze sidiĝis sur unu el la seĝoj. Ŝi havis okulojn fermitajn kaj estis tre pala, mi ektimis, ke ŝi svenos ĉe mi. Sed jen ŝi jam malfermis la okulojn kaj montris al mi sian feliĉon dronantan en larmoj; nenio malbona, ŝi estis nur feliĉa. Mi vidis tion kaj mi faris, kion sub tiuj kondiĉoj nur estis eble fari; mi ekfrenezis. Mi murmuris konfuzajn vortojn, kiuj marŝis surkape, sed mia koro estis dum tio serioza, mia koro kuris dum tio plej seriozan ĵuron.

Nia vespermanĝo ŝanĝiĝis en freneze gajan bataleton kaj post la vespermanĝo mi ne plu regis min. Mi subite eksaltis kaj kure prenis jakon kaj ĉapelon. Marta demandis surprizite, sed ne ricevis respondon; mi surmetis sole misterplenan mienon kaj sendis al ŝi de ĉe la pordo kison.

Post kelkaj momentoj mi staris en delikataĵejo. „Du botelojn da mosela!“ Kaj dum oni pakis la vinon, mi elprenis horloĝeton kaj rigardis senpacience la flugantan sekundmontrilon. Marta atendas, Marta atendas, flustris haste mia tuta interno. Fine mi firmitenis la botelojn en la brakoj kaj rapidis eksteren. Kaj jen subite mi staris antaŭ obstaklo. „Ĉu tio estas efektive vi?“ diris tiu obstaklo. Ĝi diris tion per voĉo, kiu estis al mi tre bone konata kaj tio estis la unuan fojon, ke tiu voĉo falis kiel ŝnurkaptilo ĉirkaŭ mian kolon, ĉar la virino, kiu jen staris antaŭ mi, neniam estis malbona al mi, kelkajn semajnojn de mia juneco mi metis en ŝiajn manojn kaj neniam mi bedaŭris tion; ŝi havis koron dancantan, nudpiedan kaj preteriris mian vivon facile, kvazaŭ ŝi estus preterdancinta. Kaj nun ŝi staris jen antaŭ mi, vidis verŝajne mian ektimon kaj ekridis:

„Sed ne, ne... Peĉjo... tamen ne... ĉu mi do estas timigilo?“, kaj aldonis pli mallaŭte: „Peĉjo edziĝinta...“

Mi levis la okulojn nun kaj ekvidis ŝin; ŝi certe havis ĉiam ankoraŭ koron dancantan kaj nudpiedan. Mi vidis ŝin, sed pensis pri Marta, kaj se mi volis tiumomente ion diri, tio estis nur pri Marta; ke Marta atendas, ke por mi ekzistas nenio alia krom Marta; ion tian.

Sed anstataŭ tion mi aŭdis mian voĉon kaj mia voĉo estis neordinare ridinda: „Bonvenon en Prago, Ida,“ mi diris.

„Peĉjo, Peĉjo!“ Ŝi balancis la kapon kaj ridis.

Tramo preterveturis, faris krak! krak! kaj poste ĝi nur zumis kiel granda metala skarabo. Lumisto paŝis tra la strato kaj metis sur la kandelabrojn helajn ĉapetojn. Mi diras „helajn ĉapetojn“, ĉar tiel mi vidis ĝin kaj ĉe tio mi

pensis pri Marta; mi pensis, ke tio eble plaĉus al ŝi. Aŭskultu nun, Marta, mi diros al vi ion belan...

Mi levis la kapon, ekvidis Idan kaj ekmiregis.

„Ida?“, mi diris kvazaŭ mi estus nur nun rimarkinta ŝin. Ne, jam antaŭe mi vidis ŝin, sed mi tute forgesis ŝin por kelkaj sekundoj, tiom mi tiutage apartenis al Marta. Kaj nun mi preskaŭ ekhontis, ke mi kapablas stari kaj kondukti malbele al Ida, kiu neniam estis malbona al mi.

„Ne koleru, Ida. Vi ja scias, mi ofte estis tia, kvazaŭ falinta de la ĉielo,“ mi diris.

„Ne, ne, vi ne estadis,“ ŝi kapneis kaj rigardis min atente per duonfermitaj okuloj. Poste ŝi ekmordis la malsupran lipon.

„Ni ne startu,“ ŝi diris. Kaj ni iris.

Kaj kiam mi ĉe ŝia flanko faris kelkajn paŝojn, mia tuta feliĉo subite ekstaris denove antaŭ miaj okuloj. Ankaŭ Ida nun apartenis al ĉio ĉi, mi renkontis ŝin hazarde, kiam venis mia granda tago, eĉ tio havis sian apartan belan sencon. Kaj spirite mi babilis kun Marta: Do, vidu, Manjo, tio ĉi estas Ida, Koro dancanta kaj nudpieda. Ŝi nur preteriris, por ke ŝi vidu nian grandan feliĉon. Bona ŝi, ĉu?

Kaj tiam Ida deflanke rigardis min kaj en ŝia vizaĝo ludis rido kiel venteto en florbedo.

„Ĉu tre feliĉa?“

Mi nur kapjesis. „Kaj vi?“

Ŝi elspiris antaŭ sin mallongan rideton kiel malgrandan arĝentan ondon, kiu portas kison al la alia bordo. „Mi? Vi scias ja. Knabojn mi ankoraŭ ĉiam amas. Kaj tiom longe, kiom la knaboj volos min. Mi alvenis antaŭ du tagoj el Vieno. Sed baldaŭ denove mi forveturos.“

„Kien?“

„Eble al Parizo, mi ankoraŭ ne scias.“

Kaj tiel ni iris kaj babilis. Poste ĉe iu domo Ida haltis. Tie ĉi mi loĝas, ŝi diris; mi invitus vin, sed tion fari mi nun ne plu povas... Ŝi aldonis ridante. Kio? Tia filistro ŝi konsideras min? Kaj tiel bagatele ŝi pensas pri Marta? Mi estis tuj decidiĝinta, mi iros kun ŝi. Ŝi provis malhelpi min, sed vane. Freneza feliĉo eksieĝis min; mi kuregis; mi povis atingi la promesitan teron, aŭ rompi la nukon: kompreneble, tiumomente mi vidis nur la promesitan teron.

Supre en la ĉambro mi etendis al Ida ambaŭ manojn. „Mi dankas vin, Ida, mi dankas,“ mi diris kaj mia voĉo estis plena de dankemo.

Ŝi balancis la kapon kaj ridis. „Pro kio?“

„Senkaŭze. Mi dankas, mi dankas. Mi emas danki vin, la tutan mondon mi emas danki.“ Stranga rideto flirtis ĉirkaŭ ŝiaj lipoj. „Ho, kun vi estas malbone!“, ŝi diris.

Estis kompreneble nur ŝerco, kion ŝi nun diris kaj mi ne pensis plu pri tio. Mi sidis poste en apogseĝo kontraŭ ŝi kaj devis por momento fermi la

okulojn. Koro dancanta kaj nudpieda, mi pensis. Kaj erarvaga! Neniam ĝi enhaveniĝos kiel mi... neniam ĝi havos sian grandan tagon... Ida ekridis kaj mi malfermis la okulojn.

„Nun vi enpense bedaŭris min, ĉu?“, ŝi diris. Mi embarasiĝis, mi volis ion diri, sed ŝi ridis; ŝiaj okuloj rigardis min moke kaj indulge. Poste ŝi ĉesis ridi kaj kovris per mano la okulojn, kvazaŭ ŝi ekmeditus.

„Vi, Peĉjo,“ ŝi diris mallaŭte.

„Nu?“

Ŝi ankoraŭ ĉiam kovris la okulojn per mano kaj ŝajnis heziti. Sed subite ŝi balancis la kapon kaj stariĝis.

„Ne, nenion,“ ŝi diris. Mi sole volis doni al vi ian konsilon; komika ideo, ĉu?... Kaj krome, nenia helpo, vi devas jam iri... Mi vestos min, mi volas viziti teatron.“

Do, mi iris. Malsupre, sub lanterno mi rigardis poŝhorloĝon; entute mi eĉ ne estis multe deteninta min. Kaj se mi jam iom detenis min, mi ja intencis kompensi tion. Spiregante kaj feliĉa mi aperis post momento antaŭ Marta; ŝi vidis la botelojn en miaj brakoj kaj ekdancis tra la ĉambro.

„Ho, kiel vi antaŭ momento malaperis, kiel elpafita!“, ŝi diris poste kaj ridis. Eĉ ŝerci ŝi ekemis. „Ja mi pensis vere, ke vi forkuris de mi al iu el viaj malnovaj amoj...“ Je tio mi faris tion, kion estus farinta ĉiu prudenta viro; ankaŭ mi respondis per ŝerco... Ne, mi ne faris tion. Mi estis tro feliĉa kaj forgesis porti mian feliĉon tro singarde kiel pokalon plenigitan ĝis la rando. Mi rakontis al Marta, kiel mi renkontis Idan. Mi ne faris mienon de pekinto rakontante, ĉar ne estis peko en mia konscienco. Kaj mi eĉ memoras, ke rakontante pri Ida, mi kantis himnon pri Marta.

Kaj tiam mi rimarkis ŝian vizaĝon. Ŝiaj okuloj elkriis ian teruran miregon kaj poste ili ŝajnis ŝuti cindron, dum ŝi tute blankiĝis; kaj tiu blanko ŝajnis kreski kaj grandiĝis antaŭ miaj okuloj je ia terura, blanka muro, malantaŭ kiun mi neniam plu paŝos. Mi etendis al ŝi la brakojn, sed tiam ŝi nenature rektiĝis kaj komencis terure plorsingulti.

Kion diri pli?

La du, tri horoj de tiu vespero, dum kiuj Marta alternis en histeria plorado kun kalumnioj akraj, maljustaj, en nesilentigebla riproĉado per kelkaj kaj ĉiam la samaj vortoj kun muta vagado de elorbigitaj grandaj okuloj - la du, tri horoj de tiu vespero, dum kiuj mi alternis en arda konfesado kaj minacado, petado kaj malbenado, rampado sur genuoj kaj furiozado, tiuj horoj sufiĉis, por ke ili ĵetu nian amon al niaj piedoj, trapikitan per mil piko. Kaj post kelkaj tagoj mi iris al Ida. Ankoraŭ dufoje mi estis poste ĉe ŝi. Kaj kiam mi iris tien la trian fojon, ŝia pordo estis fermita. Ŝi estis forveturinta. Mi komprenis tion. En tragikomedio por ŝi ne estis rolo.

Tradukis Vuk Echtner

Ĉielarka punkto super la kapo Jakub Arbes

Grizluma kaj sobra tago kliniĝis al fino.

Vibre deflugis dum absoluta senvento la unuopaj neĝeroj al tero jam de frua mateno: sed antaŭ la vespero ekblovis pli forta nordvento kaj de la nuboj komencis ŝutfali la neĝo en tutaj plenmanoj.

Mi rigardis en la neĝblovadon, ĝis min, – enuigitan – la rigardado enuigis en supera mezuro.

Cetere ne estis eĉ eble alie.

La kelkmonata apartigo de la familio, de amikoj kaj konatuloj kaj senekzemple unuforma vivo, kiun mi devis vivi, ne restis sen certa influo al mia alie persista organismo.

Mi ja estis trankvila, ŝajne eble eĉ indiferenta, aŭ almenaŭ rezigna; malgraŭ tio en multaj momentoj, precipe dum longaj vintraj vesperoj kaj ankoraŭ pli longaj noktoj, kiam dum kompleta izoliteco mia fantazio pli forte senbridiĝis, mi estis nepriskribeble malgaja.

Kompreni mian tiaman staton estas tamen eble ne malfacile. Mi loĝis ja tute sola en simpla, malgranda teretaĝa ĉambreto. Krom tabula lito apud unu muro, malgranda tableto sub la fenestreto – kontraŭ dika kverka pordo – unu seĝo, kofro kaj breto kun libroj, ne estis en la ĉambreto alia meblaro.

Nur la malgranda kaj nome tiel alte situanta fenestreto, ke mi devis suprengrimpi la tablon, se mi volis elrigardi en la pejzaĝon, atestis pri ia eksterordinareco.

Ĝi estis kradita kaj mi – malliberulo.

Kompreneble malliberulo, al kiu la konscienco faris neniajn riproĉojn – malliberulo politika kaj, plie, ŝafido deprenanta politikajn pekojn de siaj kolegoj ĵurnalistoj; sed ĉio ĉi tamen nenion helpas, se oni scias, kun kia senekzempla enuo oni pasigis ĉi tie iom pli ol kvaronjaron, kaj estas konvinkita, ke oni simile agrable devos ankoraŭ vivi tempon preskaŭ trioble tiom longan.

Kio kirlis dum longaj sendormaj noktoj mian animon en la malliberejo de Česká Lípa, rezistas priskribon.

La nervosistemo difektita de nenatura vivo komencis jam montri naturajn sekvojn.

La iom post iom veninta melankolio ŝanĝiĝis nerimarkeble en hipoĥondrion. Indiferenteco, eĉ malfortiĝo de sentemo alternis ĉiam pli senpere kun senteksplodo.

Multfoje mi rigardis dum tutaj horoj senpense en nedifinitan malplenen. Subite vidiĝis antaŭ mia psika vido ia bildo el pasinteco – mia koro kunpremiĝis per neeldirebla doloro kaj la okuloj malsekiĝis.

Alifoj mi senvole pugnigis la manon kaj ekminacis sencele en malplenon; iam mi eĉ sovaĝe ekkriis kaj tuj poste ŝajne senkaŭze ekĝemis – kaj denove mi indiferente ien fiksis la rigardon, ne sciante kial.

Kaj tiel aŭ almenaŭ simile mi sentis ankaŭ ĉi-foje, kiam enuiĝinte per la rigardado al la neĝblovado, mi desaltis de la tablo.

Longe mi trairadis la ĉambreton, ĝis fine mi faligis min sur la tabulliton kaj ekrigardis la plafonon.

En la ĉambreto regis jam duonlumo.

El ekstero penetris al mia aŭdo sible tirata kaj tuj poste fajfe interrompata muĝo de la vento kaj lulis min en meditado.

Mi pensis pri nenio; sed mia fantazio tamen laboris. Estis kristnaska vespero kaj tra mia animo migris iuj necertaj rememoroj. Mi rememoris miajn infanojn. Venis al mi ideo, ke eble ili nun saltetas ĉirkaŭ la kristnaska arbeto aŭ ludas kun la kripo – ke ili eble dum tiuj momentoj eĉ rememoras min.

Mi jam estis post vespermanĝo – simpla kaj ordinara – kaj havis neniajn dezirojn ol okupi mian spiriton per karaj bildoj, kiuj min ĵus ĉirkaŭflugadis, kiom eble plej longe.

Sed – kio jam longe ne okazis, tio okazis la nunan fojon: la palpebroj de miaj okuloj senvole fermiĝis kaj mi ekdormis...

Mia sonĝo estis ĥaosa miksaĵo de efektivaj impresoj de la ĵus pasintaj tagoj kaj de hazardaj fantasmagorioj.

Komence mi sonĝis, ke mi staras – kiel okazis ĉiun tagon tage kaj nokte kelkfoje – sur la tablo kaj rigardas dum luhela nokto tra la fenestro en la pejzaĝon.

Mi vidis ĉion, kiel ĝi vere estis: malgrandan laŭlongan korteton, apartigitan per alta latbariero de granda florigardeno – dekstre kaj maldekstre ĝardenojn kun fruktarboj – kaj en la fono kampojn kaj herbejojn ĝis la stacidomo, malproksima proksimume dek minutojn da vojo, kaj fine, plej malantaŭe, neklarajn konturojn de montetoj, per kiuj la horizonto estis limigita.

Ĉion tiel klare kaj fidele, kiel mi jam estis ĝin vidinta sennombre da fojoj dum la plej sunbrilaj tagoj.

Mi sonĝis, ke mi rigardas sencele kaj ree tamen, kvazaŭ mi laŭvere streĉe aŭskultus, ĉu ne aŭdiĝos raŭka, iam eĉ fajfspira kaj sufoka, kaj iam eĉ spasma tusado, kiun mi ĉi tie aŭdadis ĉiun nokton.

Fine la tusado aŭdiĝis – el profundo kaj de malproksimo.

Ŝajnis al mi, ke ĝi malproksimiĝas kaj tamen tuj en la sekvanta momento ĝi aŭdiĝis sub la fenestreto kaj mi ekvidis sur la korteto grandan, sed okulfrape ĝibiĝintan figuron en malhela mantelo kaj kun lutroĉapo sur la kapo. Ĝia vizaĝo estis turnita al la fenestreto kaj ĝi troviĝis en ombro: malgraŭ tio ŝajnis al mi, ke mi distingas tute klare ĉiun trajton: ke mi vidas sulkan vizaĝon de proksimume okdekjara maljunulo kun esprimo de senmezura senespero.

Mi vidis ofte tiun fizionomion de distanco sole kelkpaŝa, laŭvere nokton post nokto, sed ĉiam nur aŭ dum lunlumo aŭ dum malhelaj aŭ grizaj noktoj, iam ĉe malklara brilo de lanterneto.

Tiu viro patrolis tusadante dum la tuta nokto sur la korteto, kiel lia devo ordonis al li.

Tuj la unuan nokton mi alparolis lin el la fenestreto kaj li respondis al mi. Ekde tiu tempo mi interŝanĝis kun li ĉiun nokton almenaŭ kelkajn ordinarajn vortojn.

Mi eksciis, ke li estas malnova soldato – unu el tiuj, kiuj sangis apud Lepsiko kaj ke li jam pli ol kvardek jarojn dum noktoj gardas en la domo de regiona tribunalo de Česká Lípa por salajro de kelkaj krejceroj po nokto.

Neniam ankoraŭ kortuŝis min la sorto de tiu mizera ekzistado tiamezure kiel ĵus nun – en sonĝo. Mi sonĝis, ke mi nepre devas fari ion por la mizerulo. Sed antaŭ ol venis al mi ideo, kiamaniere, la bildo aliiĝis.

Mi sonĝis, ke mi vagas tra nebulkovrita pejzaĝo – ĉirkaŭe estas videblaj en malproksimo sole necertaj siluetoj de unuopaj palmarboj.

Sed mi turnu min en kiu ajn direkto, ĉie ĉirkaŭas min frosta rigideco.

Mi sonĝas, ke mi erarvagas jam longe – terure longe.

Dum momentoj mi supozas, ke mi alproksimiĝas al tiu aŭ alia palminsuleto; sed tuj mi rekonvinkiĝas, ke mi ne alproksimiĝis eble eĉ je unu paŝo, ke mi propre ŝanceliĝas ĉirkaŭ unu sola punkto.

Kaptis min stranga angoro.

Mi sentis kiel homo, kiu komencas konvinkiĝi, ke li ne forsavos sin de danĝero, kiun li volis eviti, sed kiu estas per vana klopodo por savo tiom lacigita, ke li jam nenion alian deziras, ol ke la turmenta necerteco finiĝu.

Jen mi rimarkas en malproksima horizonto ian pli luman punkton, kvazaŭ pli hela stelo briletus tra densa nebulo.

Senvole mi ekpaŝas tiudirekten.

Subite vipis ĝuste kontraŭ mi blanka fulmo.

Konsternite mi haltas kaj rigardas en malproksimon.

El la griza nebulo elradias pli palaj strioj kaj en kelkaj momentoj al mi ŝajnas, kvazaŭ mi rigardus en arĝentan brilegon.

Subite mi vidas ĉion en plena arĝentlumo kaj distingas unu el la plej belaj bildoj de Correggio: la mondfaman „Sanktan nokton“.

Mia angoro ŝanĝiĝas en miregon.

Mi ne komprenas kaj tamen al mi ŝajnas, ke mi ne staras antaŭ nura bildo, sed antaŭ efektiva okazaĵo.

Mi volas pluiri, sed post la unua paŝo la bildo denove ŝanĝiĝas.

Mi sonĝis, ke mi iras dum vintra nokto tra stratoj de Prago kaj aŭdas la sonadon de sonoriloj. Mi rekonas la stratojn kaj komencas konvinkiĝi, ke mi marŝas en la katedralon de sankta Vito al meznokta meso.

Sed subite mi staras en la katedralo mem antaŭ la maŭzoleo de ĉeĥaj reĝoj.

Sennombraj lumoj kaj tamen mistera duonlumo – modera tumulto kaj murmuro – majestaj sonoj de orgeno – ĉio vekas en mia animo kortuŝajn rememorojn el foraj tempoj.

Subite ŝajnas al mi, ke mi aŭdas mian nomon. Mi ne komprenas, kiu kaj kial min povus voki ĉi tie: sed mi aŭskultas pli atente.

Mi aŭdas mian nomon kelkfoje sinsekve – ĉiam pli laŭte – ĝis fine ĝi eksonas kiel angora ekkrio...

Mi vekigas.

En unua momento mi eĉ ne komprenis, kie mi troviĝas. Mi aŭdis nur tute klare el malproksimo la obtuzan sonadon de sonoriloj kaj rimarkas, ke la duonlumo ŝanĝiĝis en lunan lumon.

Nur kiam mian aŭdon atingis la siblanta bruo de la vento kaj mi ekrimarkis, ke sur la kontraŭa muro vidiĝas la ombro de mia kradita fenestreto, mi rememorigis al mi, kie kaj kial mi troviĝas – en kiaj cirkonstancoj mi ekdormis kaj en kiaj mi vekigas.

Sendube proksimiĝis la noktomezo kaj en la urbo oni sonore invitis al meznokta meso. La neĝblovado estis intertempe jam ĉesinta kaj la firmamento heliĝis. La luno, preskaŭ en sia pleno, ĵetis abundan brilon en la ĉelon kaj la siblanta vento estis evidenta pruvo, ke ekstere regas kreviga frosto. Sed ĉio ĉi estis por mi dum la ĵusa momento absolute egala. Eĉ la stranga sonĝo, kiu ĵus min preskaŭ emociis, perdis en maldormo sian misteran povon.

Mi restis kuŝi surdorse, kiel mi vekigis.

De tempo al tempo transflugis malpezeta nubeto la lunon – en mia ĉelo mallumiĝis; tamen post momento en ĝi ekregis ree antaŭa duonlumo.

En mia animo ekvibris rememoroj. Mi estis neeldireble korpremita.

Tiel mi kuŝis kun malfermitaj okuloj kelkajn minutojn.

Kelkfoje mi fiksis la rigardon sur la malhelan silueton de la kradita fenestreto sur la kontraŭa muro kaj unufoje mi senintence levis la okulojn ankaŭ al la plafono.

Sed kio okazas?

En mallarĝa strio de la lunlumo, enpenetranta tra la fenestreto, mi rimarkas en la aero ian pli luman punkton.

En la unua momento ĝi eĉ preskaŭ ne estis surpriza. Mi ekrimarkis ĝin nur kaj rigardis ree la kontraŭan muron.

Post momento – sed pli eble instinkte ol konscie aŭ eĉ kun ia intenco – mi ekrigardis denove al la plafono.

La punkto ŝajnas troviĝi sur la sama loko kiel antaŭe: proksimume unu kaj duonon da tuto for de la plafono kaj preskaŭ super mia kapo.

Mi observas ĝin pli atente kaj trovas, ke ĝi malklare brilas, kvazaŭ la lunbrilo reflektigus de ronda malseka korpeto.

Tiu kuriozaĵo, kiun mi aljuĝis al ia optika trompo, ne estus kaptinta mian atentemon por pli longe, se mi ne estus rimarkinta, ke la malklare brilanta punkteto ŝanĝas ne nur sian brilon, sed ankaŭ sian pozicion.

Dum momentoj al mi ŝajnis, ke ĝi brilas eĉ en malbelaj koloroj ĉielarkaj kaj ke ĝi malaltiĝas kaj tuj ree leviĝas perpendikle alten.

Mi dediĉis al la stranga aĉeraĵo pli akrigitan atenton.

Mi rektigis min kaj post momento eĉ leviĝis.

Deflanke observita, la punkteto ŝajnis al mi pli granda kaj brila; sed ĝi estis tro alte super mi. Observite de la pordo, sekve kontraŭ la fenestreto, ĝi malaperis aŭ mi almenaŭ ĝin ne rimarkis, sed – tuj kiam mi staris ie ajn inter la fenestro kaj la punkto, mi ekrimarkis ĝin ree pli aŭ malpli klare.

Post pli longa tempo de observado mi svingis la manon en la aeron kaj al mia granda ekmiro mi rimarkas, ke la brila punkteto forbalanciĝis en la direkton, kien mi svingis la manon, sed ke ĝi samtempe kun frapa rapideco suprenleviĝas, ĝis ĝi malaperas en duonlumo.

Tiu malapero ekscitis mian scivolon en ankoraŭ pli granda mezuro. Dum momento mi fikse rigardis la lokon, kie la ĉielarkkolora punkto malaperis: sed kiam ĝi ne plu aperis, la rigardado fine tamen tedis min. Kaj mi ree ekkuŝis kiel antaŭe.

En la spirito mi klopodis klarigi la simplan sed tamen tiel strangan aĉeraĵon per natura maniero. Kvankam venis al mi tia aŭ alia ideo, tamen nenio kontentigis min.

Estas tute nature, ke mi ekrigardis la plafonon en diversaj intervaloj kelkfoje; sed mi vidis nenion plu.

Subite mi rimarkas la misteran punkton denove kaj proksimume en la sama loko kiel la unuan fojon kaj krom tio – mi vidas tute klare, ke ĝi rapide malaltiĝas.

Senvole mi rapide eksaltis por konvinkiĝi, kio estas la kaŭzo de tio; sed la punkto malaperis en kelkaj sekundoj kiel la unuan fojon.

Mi ekridis kaj tamen mi estis – mi konfesas tion – iel ĝenata.

La neklarigebleco de la stranga aĉeraĵo ekscitis ne nur mian scivolon, sed ankaŭ la malsane senteman fantazion. Venis al mi multaj ideoj, kiujn mi tamen tuj resendis en la regnon de fantomoj kaj superstiĉoj; sed tamen mi sentis nur kiel homo, en kies animon malgraŭ ĉiu rezisto enŝteliĝas io, kio ne estas malsimila – al timo.

Mi dediĉis nun la plej zorgan atenton ne nur al la loko, kie mi estis rimarkinta la ĉielarkan punkton, sed ankaŭ al la loko, kie ĝi malaperis. Kelkfoje mi svingis ambaŭ manojn en la aeron, mi supreniris eĉ sur la tabulliton, por esti pli proksime al tiu loko; sed ankaŭ nun mi rimarkas nenion.

Do mi kuŝiĝis denove kaj dediĉis nun la atenton ekskluzive nur al la plafono super mia kapo.

Minuto pasis post minuto, sen ke mi estus ion rimarkinta.

Subite mi vidas la ĉielarkkoloran punkton denove. Ĝi malsupreniĝas malrapide perpendikle ĉiam pli. Mi eksaltis.

Jen mi rimarkas, ke la punkto ŝanĝis sian direkton kaj anstataŭ malsupreniĝi perpendikle, ĝi malaltiĝas oblikve en la direkto al la fenestreto super la tablo. Ne deturnante miajn okulojn de ĝi mi eksaltis sur la tablon kaj ekbruligis alumeton. Kaj nur nun mi rimarkis tute klare, ke ĝi estis malgranda flaveta araneeto rampanta rapidege laŭ longa oblikva araneaĵo de la plafono al la kradfenestreto.

Estas nature, ke mi komencis ridi el tuta animo. Sed la araneeto malaperis kaj mian atentemon kaptis la neĝkovrita pejzaĝo en plena lunbrilo.

Mia rigardo rondflugis ĉirkaŭe sur la pejzaĝo kaj forvagis ankaŭ en la korteton antaŭ la fenestreto, kie kuŝis en la neĝo homa figuro.

Laŭ la mantelo kaj la lutroĉapo mi ekkonis la noktogardiston.

Ceteron mi divenis. Verŝajne la maljunulo alproksimiĝis sub la fenestron de mia ĉelo kaj aŭ pro malforto aŭ ĉar li estis ebrieta.

En palpebruma rapido mi malfermis la fenestreton kaj ekkriis en la silentan nokton.

En la ĉelon enblovis frosta aero, ĝis mi ekstremis. Sed al mia ekkrio neniu anoncis sin kaj la figuro en la neĝo sub la fenestreto eĉ ne movis sin.

Kio sekvis, tio rezistas priskribon.

Mi estis konvinkita, ke la mizerulo aŭ estas jam morta, aŭ en mortdanĝero.

Mi vokis, kriis kaj kriegis – sed en silentan kaj samtempe lunhelan nokton.

Minuto pasis post minuto. Mi desaltis de la tablo kaj frapegis kaj piedbatis sur la pezan kverkan pordon – mi frapegis kaj bategis per kio ajn, kio venis en miajn manojn, sur la murojn dekstren kaj maldekstren... Sed nenio helpis...

Ĉirkaŭe nenio aŭdiĝas krom sibla vento – eĉ la bruo de sonoriloj en malproksimo estis jam silentiĝinta.

Kaj ree mi suprensaltis la tablon kaj ree – mi vokis, kriis kaj kriegis... Dum momentoj mi kondukis kiel homo seniĝinta de sensoj; sed nenio helpis.

La maljunulo en la neĝo kuŝis sen movo kaj nenie viva animo aŭdiĝis.

Fine proksimume post duonhoru mi ekaŭdis homajn voĉojn kaj baldaŭ poste aperis sur la korteto la provoso. Kelkaj vortoj sufiĉis por klarigo. La provoso kun streĉo de ĉiuj fortoj entiris la maljunulon ien en la domon kaj mi restis en mia ĉelo ree sola.

Mi fermis la fenestron kaj ĵetis min laca sur la tabulliton: sed pri dormo ne estis eble eĉ pensi. Mi ekdormis nur antaŭ la mateno kaj estis turmentita de teruraj sonĝoj, kies centro estis la araneeto, sen kiu la maljuna noktogardisto sendube estus senhelpe pereinta.

Tradukis V. Ĉech

Mia kunklasano Tureček Ignát Herrmann

Nemultaj el miaj antaŭaj kunklasanoj restis tiel en mia memoro kiel tiu eta, mallarĝa, kurbeta Tureček, kun kapo iel konusa, kun miopaj, palpebrumantaj okuloj. De la momento, kiam mi mem foriris el la lernejo, li tute ne venis antaŭ miajn okulojn, kaj tiel mi lin vidas antaŭ mi ĉiam kiel knabeton, kiel infanon.

Sed, vere, ŝajnas al mi, ke Tureček eĉ neniam estis infana kaj tiel li ŝajnis al ni ĉiuj liaj kunklasanoj, jam tiam, antaŭ preskaŭ kvardek jaroj. Li ja estis el ni ĉiuj eble la plej malgranda, sed iel kuntiriĝinta, sekiĝinta kiel seka pomo, kaj lia vizaĝo havis jam tiutempe kvazaŭ sulketojn. Li ne partoprenis niajn ludojn kaj peladojn, li havis korpon malfortetan kaj malsanetan. Sole du vojojn li konis: el la hejmo al la lernejo kaj el la lernejo hejmen. Nur kelkfoje li deflankiĝis irante de la lernejo, por stari dum momento antaŭ la montraj fenestroj de la librovendejo Pospíšil aŭ Hejzman kaj tie li, kun okuloj elirantaj el la orbitoj, kvazaŭ englutis la titolojn de la libretoj ekspoziciitaj malantaŭ la vitro. Ho, kiom da ili estis tie, kiujn li tiom ŝatus posedi! Ĉar Tureček estis pasia leganto. Kaj tiam en la lernejo ankoraŭ ne estis aranĝita libropruntejo. Atingi novan, ankoraŭ ne konatan libreton – kia maloftaĵo!

Sed ĉefe la parolmaniero de Tureček ne estis knaba, infana. Ŝajnis, ke en tiu konusforma kapo estas jam saĝo, tute vira, serioza prudento. Li nenium incitis, inciton li respondis per neafabla grimaco kaj iris laŭ sia vojo senvorte. Li ne serĉadis avide pakfapsulojn kaj pulvon, li ne preparis vulkanojn, li ne ludis per ludŝtipeto, neniam li flugigis paperdrakojn. Nenio lin logis al tio, je kio ĝojis ĉiuj ceteraj tremante pro senpacienco. Li apatie aŭskultis rakonti pri ĉiuj bubaj heroaĵoj, kun frunto sulkigita, kaj ne eksopiris la ekspediciojn sub la soldatan bakejon, sur la remparon, en la fosaĵojn remparajn. Estas ja vere, ke la kompatinda Tureček ne estus forkurinta eĉ antaŭ unu „rempara kaporalo“ kiel ni ceteraj. Kaj oni rakontis terurajn aferojn pri la nigra kelaro, kien laŭdire provoso Masslinger – maljuna, ruĝhara serĝento servinta proksimume kvardek jarojn – arestis ĉiun, kiun oni kaptis en la fosaĵo, kvankam neniu povis paroli laŭ propra sperto.

Sed tamen estis momentoj, kiam viviĝis la morta, griza vizaĝo de Tureček. Okazis tiel, kiam iu el ni rakontis pri libro, kiun li ricevis kaj tralegis. Tiam aŭskultis Tureček plej atente, en lia vizaĝo kvazaŭ lumiĝus, liaj okuloj rapide palpebrumis, lipoj ekstremis, ĉiu vejneto ludis en lia vizaĝo. Kaj kiam estis elĉerpita la ĝenerala atento kaj la nekonstantaj pensoj knabaj turnis sin al alia direkto, tenis sin sola Tureček ĉe la rakontanto kaj avide eligis el si:

„Ĉ-ĉ-ĉ-e-ĉu vi pruntedonus al mi la libron?“

Ĉar Tureček balbutetis.

Tureček ne havis patron, eĉ en la naskolibro li ne havis lin, kaj tio eble, krom lia parta degenereco, klarigis lian tro maturan kaj pasivan karakteron. Nu,

certe, se li estus fortika kiel fago, li kelkiun estus bone batinta, kiu pro knaba petolaĵemo eligis el la buŝo ofendon, montrantan lian neleĝan devenon. Sed tiel, la bedaŭrinda Tureček sole grincis per la dentoj aŭ nubiĝis groteske, perfortante sin mem por ne ekplori. Ĉar eĉ plori li ne sciis laŭ infana maniero. La bubaĉo Ŕehák, la plej granda sentaŭgulo en mia klaso, elkriis iam:

„Kiel Tureček, tiel ploras pavianoj!“

Ĉu li vidis iam plori pavianon, ne estas konstatite. Pavianon vidi li povis, ĉar en la Malgranda Placo ofte starigis menaĝerio sian tendon, kiam ajn ĝi eniris en la remparon de nia citadelo. Ŕehák estis aĉega bubo, sed iom da vero estis en tiu komparo. Al ni ĉiuj ceteraj Ŕehák iel malfermis la okulojn, ni poste estus ŝatintaj vidi ploron de Tureček, sed Tureček des pli forte sin gardis.

Sed iam tamen Tureček denove ekploris. Estis posttagmeza instruado, jam alproksimiĝis la kvara horo, kiam ektumultis io en la pli malantaŭaj benkoj, kie sidis Tureček.

„Kion vi tie faraĉas?“, ekkriis la sinjoro instruisto.

„Tureček ploras,“ anoncis kompleze iu najbaro.

„Kial vi ploras?“, kriis la sinjoro instruisto la duan fojon. „Stariĝu!“

Tureček leviĝis, muta, singultanta. Li ne respondis.

„Kio mankas al vi?“

„Li malsatas!“, sciigis alia kompleza najbaro lernanto.

„Li elspezis la monon, kiun li havis por tagmanĝo,“ laŭtiĝis nun kunklasano Ŕehák, „kaj ne manĝas kaj nun li malsatas.“

„Kien vi donis la monon?“, ektondris la sinjoro instruisto.

„Li aĉetis al si libreton anstataŭ tagmanĝo,“ rakontis la denuncanto.

Tureček viŝis per maniko siajn okulojn, cetere jam sekajn, lia konusa kapto ŝovis sin dekstren, maldekstren kaj lia rigardo ektuŝis kun plej amara plendo ĉiujn denuncantojn, kiuj lian sekreton elportis en la lumon.

„Venu ĉi tien, montru ĝin!“, ordonis la sinjoro instruisto.

Kiel malfacila estis tiu iro por Tureček! Faletante li ŝovis sin el la benko kiel lama, kunpremante per fingroj de la maldekstra mano la libreton. Li ne manĝis por akiri ĝin kaj nun li perdos ĝin. Ĉar ĉio, kio estis alportita de iu en la lernejon krom la instruaj helpiloj, estis konfiskita, se ĝi estis kaptita. Tureček sciis tion kaj lia maldika vizaĝo nun denove tute ekploris, ne plu pro malsato, sed pro tiu senpova infana malespero antaŭ la ĉiopovo de la instruisto. Li ne manĝis – kaj li estos senigita de trezoro, kiun li certe longe sopiris.

Ni nun vere vidis, ke li ploras, kiel paviano, sed neniu el ni ridis. Ni kompatis lin. Tureček neniam faris al iu el ni ion malbonan.

Per tiraj paŝoj li trairis ambaŭ benkovicojn kiel ligita, por ke li laŭeble plej longe ne bezonu adiaŭi la libron, sed la vojo estis tamen nur mallonga. Nun li staris antaŭ la sinjoro instruisto kaj kvankam ĉio protestis en li, kvankam

lia tuta estaĵo sin defendis kontraŭ tiu maljustaĵo, li etendis la manon kaj transdonis al la instruisto la libron. Kaj la mano falis al la flanko. Nun Tureček ŝajnis al ni ankoraŭ pli malgranda kaj pli kuntiriĝinta ol li efektive estis.

Ĝi estis dika volumo, kiun li donis al la instruisto, en niaj okuloj vera biblio. Kaj la sinjoro instruisto legis desur la kovrilo:

„Malkovro de Ameriko per Kristoforo Kolumbo.“

„Kie vi ĝin aĉetis?“, li demandis la knabon.

Tureček certe en tiu momento ne vidis antaŭ si la figuron de la instruisto, sed ian nemezureblan, teruran materion, ĉar liaj okuloj estis superfluitaj de larmoj, kiujn Tureček tiel ŝparadis. Kaj kun tremantaj makzeloj li respondis: „Ĉe Pospíšil.“

La instruisto ekrigardis lin. Certe li kompatis la knabon en tiu momento. Eble eĉ la libro mem metis lin en alian humoron. Estis libro bonega, nenia „Babinský, estro de la rabistoj“, kiun li konfiskis jam ĉe kelkaj lernantoj, nek „Historio pri Eulenspiegel“ en la malnova eldono, presita per gotikaj literoj, kiu enhavis tre pipritajn detalojn pri la petolaĵoj de Eulenspiegel, kun krudaj, tre kompreneblaj lingvogravuraĵoj.

Li tiel dum momento rigardis la infanon, li foliumis la libron, fermis ĝin, metis sur la katedron kaj diris:

„Iru sidiĝi, post la instruado vi ĝin rricevos.“

Al Tureček deglitis la lastaj larmoj el la okuloj. Per senmezura ĝoja miro li preskaŭ ŝanceliĝis kaj rapide sin movis en sian benkon. Tio estis la unua fojo, kiam la sinjoro instruisto redonis konfiskitan objekton.

Post la instruado rapidis Tureček al la katedro.

„Atendu!“, ordonis la instruisto.

Tureček komprenis. Kiam la ceteraj foriros. Kaj kiam la lernejo malpleniĝis, demandis la instruisto:

„Ĉu vi ne manĝis?“

„Ne manĝis.“

La instruisto surpaŝis la podion, malfermis la tirkeston de la katedro kaj elŝovis kaj metis sur la platon de la katedro, kion dematene li estis forpreninta de la nekvietuloj. Ian rondbulkon, pomojn kaj mielkukan figuron.

„Metu tion en viajn poŝojn, formanĝu...“

Eble Tureček ankoraŭ malsatis, sed eble eĉ ne plu. Li enŝtopis la nutraĵojn en siajn poŝojn, sed pleje li brilis pro ĝojo, ke li havas denove sian Kolumbon. Atendis lin tiam antaŭ la lernejo kelkaj el ni kaj kiam Tureček post momento eliris el la lernejo, li aspektis vere kiel feliĉa infano.

Tradukis Manka Ginzová

R. A. Dvorský v nové knize

Tomáš Břicháček

„R. A. Dvorský“ od Jana Müllera je první monografií uceleně mapující Dvorského uměleckou kariéru. Nová publikace potěší všechny příznivce i znalce tohoto velkého hudebníka éry šelakových desek a černobílých filmů.


S nahrávkami R. A. Dvorského jsem se setkal ještě jako malý kluk, těsně před nástupem do první třídy. Rodiče si tehdy koupili LP dvojdesku *Jen se s písničkou smát* s výběrem toho nejlepšího, co Dvorský nazpíval. Když jsem ji poprvé slyšel, velmi silně na mě zapůsobila. Písničky jako *Věřím vám*, *Plaménky v očích tvých*, *Hádej*, *Hm, hm*, *Děkuji*, *Sám s děvčetem v dešti*, *Psáno je ve hvězdách*, *Ted' raději mlč*, *Chladné polibky* nebo *Když láska mizí* jako by mi gramofonová jehla vyryla pod kůži a stejně tak zálibu v taneční hudbě třicátých a čtyřicátých let minulého století. Až mnohem později jsem se o tomto zpěvákovi, kapelníkovi, nakladateli, skladateli a vůbec všestranném hudebníkovi dovídal více – ze stručných životopisných pojednání Vladimíra Bittnera a Čestmíra Brandejse, ze vzpomínek Jiřího Traxlera, Kamila Běhouňka a Zdeňka Petra nebo z rozhlasových a televizních pořadů.


Jedinou knižní životopisnou monografií o Dvorském byl zatím Bittnerův *R. A. Dvorský, král české taneční hudby* z roku 1998. Toto průkopnické dílo bylo jistě záslužné, jeho nedostatkem však byla přílišná stručnost a skutečnost, že autor nebyl specialistou na Dvorského hudební žánr a jeho dobové souvislosti.

Jan Müller je naproti tomu odborníkem na danou oblast, který se podílel na dlouhé řadě publikačních počinů a vydávání starých nahrávek. Když jsme se někteří dozvěděli, že se rozhodl napsat nový Dvorského životopis, přijali jsme tuto zprávu s nadšením a s velkými očekáváními. Mohl jsem pak trochu sledovat postup jeho prací a vím, že se ujal svého úkolu s mimořádnou pečlivostí a se zájmem o nejmenší detaily.

Výsledkem je čtivá kniha nabitá informacemi, která podrobně pojednává o Dvorského životě a především o jeho umělecké kariéře, přičemž neopomíná širší kontext dění na tehdejší hudební scéně. Velkým přínosem publikace je důsledné zmapování Dvorského umělecké činnosti (včetně počátečních let jeho působení), ale také hlubší vhled do jeho osudů v časech komunistického režimu. Silnou stránkou publikace je bohatý obrazový materiál, který ji činí velmi příjemnou na pohled.

Příznivci a znalci R. A. Dvorského naleznou v knize důstojnou připomínku této osobnosti a zdroj k rozšíření svých vědomostí o ní. Ostatní čtenáři dostávají do rukou přehlednou pomůcku, která jim Dvorského představí a přiblíží jako umělce i člověka.





Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Prago 7